# PARIZA FEDERACIO

FEDERATION PARISIENNE DES CENTRES CULTURELS "ESPERANTO"

CCP : 10482 04 PARIS 4 bis ,rue de la Cerisaie
75004 PARIS

NOVEMBRE - DECEMBRE 1973 N° 7

## LA CERISAIE

Notre nouveau local a ouvert ses portes les 22 et 23 septembre dernier à l'occasion des réunions de bureau et de conseil de l' Union Française pour l'Espéranto. Il était normal que ce fût l'association propriétaire qui la première prit possession de son bien.

Huit jours plus tard c'était le tour de la Fédération parisienne qui s'y réunissait pour la première fois. A cette occasion son président se plut à souligner l'aide extraordinaire que lui avaient apportée de courageux espérantistes. Un palmarès en est dressé plus loin.

Le résultat de leurs efforts?

La lettre ci-contre en est le témoignage. Je la leur dédie.

R.D.

AKADEMIO
de ESPERANTO Vitry, la 2/X/73

La Prezidanto:
Prof. G. WARINGHIEN

Kara Prezidanto,

Mi volas diri al vi, post mia vizito en nian novan sidejon rue de la Cerisaie, kiom mi ŝatis la situacion de la ejo, la aranĝon de la ĉambroj kaj la tutan atmosferon de klareco, heleco kaj pureco, kiu feliĉe distingas ĝin disde la antaŭaj oficejoj, ekde la Centra Oficejo rue de Clichy. Kaj mi deziras, persone, esprimi al vi kaj al via fa milio miajn gratulojn por la sukceso de viaj penoj, kaj la grandajn dankojn, kiujn la tuta Pariza, Parizia kaj Francuja esperantistaro ŝuldas al vi pro via diligento. Mi multe timis, komence, ke nia Esperantejo lokiĝos en ia malbela kvartalo kaj kaduka domo: nun mi (egoisme) fieras, ke ĝi montras tiel plaĉan kaj oportunan vizaĝon..

Kun miaj simpatiaj sentoj, via,

G.Waringhien

---

Vendredon 9-a de novembro 1973 je la 19-a

**L I T E R A T U R A V E S P E R O** memore al:

Chavet, Despeyroux, Fréchet, Karmazine, Laurat, Paulier kaj Raymond Schwartz .

organizita de ĉiuj Esperantaj Associoj de la Pariza Regiono .

Salonego de S N C F -Norda Stacidomo (tra la 18 rue de Dunkerque - krado maldekstre de la stacidomo - atingu la 18 bis Cour des Départs - post la "Pormortintoj-Monumento" - sur la maldekstra flanko de la korto.

---

## PASINTAJ KUNVENOJ

-o- 14 OKT 73 -o- Sainte-Geneviève-des-Bois -o- Bonega dimanĉo organizita de S-ro Henry (Essonne-Espéranto) kun vizito de historiaj monumentoj en Etampes komentita de S-ano Chambaz, kampara tagmanĝo en la Parko de la Kaŝtanarbejo de Ste-Geneviève-des-Bois, kaj kunveno en la salonego Gérard Philipe kie nin interesis prezento de diapozitivoj pri Tunizio.

-o- 20 OKT 73 -o- Le Perreux -o- Inaŭguro de Filatelista Ekspozicio en kiu estis prezentita E-o - tabulo de s-roj R,Despiney kaj J.Rousseau: Ceestis la Ministro Nungesser, la prefekto Nestier, la Urbestro M. Giraud kaj la magistaro.

---

-o- Baldaŭ vi povos telefoni al la nova sidejo per la N° 278 68 86.

ooooooo

## K O T I Z O J

Kiel kutime la kasisto afable memorigas al la membroj, ke la kotizoj 1974 estas jam pageblaj; tio faciligos la laboron de la nacia kasisto.

Malgraù la plialtigo de la kotizoj, ni tamen konservis tiun por "simpla membro" kiu ebligas pagi sen tro da zorgoj ankaù por sia kunul(ino): edzo, edzino, eĉ parenco, ktp...

| | | |
|---|---|---|
| U.F.E. | Membre adhérent . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 8 F. |
| | Membre TITULAIRE (ricevas la revuon "Franca Esperantisto" : | 50 F. |
| U.E.A. | Membre "jarlibro" . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . | 34 F. |
| | Membre "Abonanto" (ricevas la revuon "Esperanto"... ....: | 68 F. |

(les cotisations U.E.A. s'ajoutent à celles de U.F.E.)

La membroj de Grupoj pagu al la kasisto de sia grupo :
( Ekz. : la membroj de la Pariza Grupo devos pagi al : Groupe Espérantiste de Paris(aldonante la kotizon de tiu grupo (10 F.)CCP 806 266 PARIS.)

La izolitaj membroj pagu al F.P.E. (CCP 10 482 04 PARIS.

La pago de nedeviga elspezo devas alporti ion: tiel farinte, vi eniras en la grandan familion de tiuj, kiuj jam trovis la solvon por la lingva ĥaoso!

Krome, vi rajtas depreni tiun sumon el via jara deklaro pri personaj enspezoj (pagoj al klerigaj asocioj).

La malpli ol 25-jaraj gejunuloj sin turnu al J . E . F . O .

## N I A S I D E J O

Kiel anoncata ĉe paĝo 1-a, mi donas la liston de esperantistoj kiuj kuraĝe, efike laboris por la translokiĝo de la sidejo kaj la aranĝo de la Cerisaie-loĝejo.

S-ro CHARENNAT (93-DRANCY) kiu la sola tuj jesis la alvokon al kunlaboro aperintan en la bulteno. Li faris mirindan laboron: farbadon, donacante ne nur multajn horojn sed krome...la farbaĵon! Kvankam li havis la doloron perdi amatan filon... li kuraĝe daùrigis sian laboron.

S-ro LECHAUX (77_VAIRES) kiu faris en la nova loĝejo multajn necesajn aranĝojn. Kvankam li fariĝis malsaneta li kuraĝe daùrigis sian laboron.

S-ro KRAEMER (78-SARTROUVILLE), S-ro GAUDRY (92-CLAMART) kaj Ge-roj BENAZECH (75-PARIS) konsistigis sindoneman taĉmenton laborante meze de la polvo de miloj da libroj dum multaj tagoj.

S-ro J.ROUSSEAU (75-PARIS) kiu kun sia edzino ame aranĝis sian novan neston.

F-ino M.Th. BOITON (07-GRANGE-LES-VALENCE) dank'al kiu ni nun estas certaj baldaù havi la telefonon.

Mi varme dankegas ĉiujn. Kompreneble mi ne forgesas la kvin aù ses gesamideanojn kiuj helpis min dum kelkaj horoj.

Devas speciale esti gratulataj la skipo de LE PERREUX kaj miaj gefamilianoj : S-ro P. GUEROUT, S-ro J.M. LENEL, F-ino Barbara ZOCHOWSKA (POLLANDO) kaj Dominiko, Franko, Izabela, Janina, Johano-Francisko, Magdalena, Maria-Luiza, Filipo, Filipo-Emanuelo DESPINEY.

Malgaja rimarko :ĉu la Pariza Grupo kiu havas la plej nombran da anoj de la Pariza Federacio kaj certe uzos la plej ofte la lokojn de la nova sidejo ne povis fari ion pli?

Roger DESPINEY

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

FONDUSO - DOMO - Se ne farinte laboron por la translokiĝo de la sidejo vi havas skrupulojn vi povas fari donacon al : U.F.E. 4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS - CCP 855 35 PARIS -

NEKROLOGIO : F-ino ROOS kiu faris gravan donacon al la FONDUSO-DOMO.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

-o-o-o-o-o-

o

## PARIZA U E A - DELEGITARO

S-ro Jean GUILLAUME, vicprezidanto de nia Federacio, havas du gravajn postenojn
1° li estas Ĉefdelegito por Francujo,
2° li estas nacia respondeculo pri Aùtomobilista Klubo.

Dum nia lasta Federacia Kongreso en Parizo, pro manko da tempo, li ne povis doni sian raporton. Do, plezure, ni prezentas ĝin al la federacianoj :
"Je la nomo de UEA mi deziras raporti al
"vi pri la laboro de la delegitoj en la
"jaro 1972.
"El la 30 delegitoj de nia federacio, nur
"12 respondis al la enketo pri la laboro
"farita.
"La plej okupata persono estas S-inoFAYOT
"kiu respondis al 71 enketoj kaj akceptis
"Place des Vosges 54 eksterlandanojn.
"Poste J.ROUSSEAU respondis al 27 leteroj
"ĉefe pri filatelio. F-ino LIOUVILLE: 11
"respondoj al gejunuloj. S-ro LARGLANTIER
" :7 respondoj pri radio.
" S-ino AMARIGLIO faris sugeston. Even-
"tuale interrilatigi la delegitojn de la
"ĉirkaùaĵo de Parizo por helpi al la Pa-
"rizanoj, okaze de vizito de eksterland-
"anoj. Ni aranĝos specialan kunvenon pri
"tio.
" Pri turismo ĉio estas en ordo sed mi
"tre bedaùras ke ne estas en nia federac-
"io delegito de GEE. instruado. Ĉu vi po-
"vus helpi?
" Fine mi estas je via dispono se vi de-
"ziras aliĝi al la aùtomobilista fako.
" La kotizo de dumviva membro estas nur
" 6 Fr kaj vi ricevos tuj la insignon.
"En tiu asocio estas jam 120 membroj en
"Francujo kaj 800 en la mondo.
" La aùtomobilista fak-vortaro estas pres
"kaù preta, kaj certe ĝi estos tre utila
"-ne nur al samideanoj sed ankaù al aùto-
"specialistoj.

J. GUILLAUME

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Homa grupo povas atingi altan celon kondiĉe ke ĉiuj grupanoj volu tion!

## U E A - D E L E G I T A R O

Eble estas necese rememorigi la rolon de delegito.

La delegito estas la reprezentanto de UEA en iu loko. Li varbas membrojn kaj funkciigas la servojn laù difinitaj kondiĉoj. Li faras tion sensalajre.

Ĉiu membro de UEA rajtas uzi la servojn de la delegitoj precipe pri komerco, industrio, trafiko, laboro, dungo, salajro turismo, instruado, junulaj, studentaj kaj virinaj aferoj, ktp.

En la tuta mondo estas 3556 delegitoj en 65 landoj. La rekordon posedas Francujo kun 337 delegitoj. Poste alvenas FR Germanujo kun 277 kaj Britujo kun 274 delegitoj. Oni trovas delegiton en : Angolo, Antiloj nederlandaj, Kostariko, Liĥtenŝtejno, Malio, Malto, Peruo, Reunio, Ruando, Sudano, Tunizio, Turkujo kaj Zairo.

Se iu el vi dezirus fariĝi delegito ke li sin turnu al la ĉefdelegito por Francujo :

S-ro Jean GUILLAUME
Pavillon N° 66, Résidence "de Grasse"
78810 F E U C H E R O L L E S
tél. 461 44 74

''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''''

## ONDOJ-ESPERANTO SUR ONDOJ- ESPERANTO SUR

Kun granda plezuro pluraj el ni aùskultis la 7-an de oktobro la bonan dissendon pri ESPERANTO, ĉe France-Culture (Dissendo "le Monde Insolite" de Philippe Esnault).

Por gratuli lin ni sendis al li tiun tekston :
" Le President de la Fédération Parisi-
"enne des Centres Culturels ESPERANTO
"félicite et remercie Mr Philippe ESNAULT
" pour sa bonne émission du 7 octobre
"sur France-Culture concernant l'Espé-
"ranto, l'encourage vivement à continuer
"à faire sortir cette langue Interna-
"tionale de ce "Monde Insolite" afin
"qu'elle devienne la Langue du Monde....

R. Despiney

+++++

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

B A L D A Ŭ L A L I B R O T A G O !

Aĉetu librojn por fari donacojn al viaj amikoj okaze de Kristnasko , Novjartago , Amikeca Semajno.......

Ankaù aĉetu librojn por vi mem !!!

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-o-o-o-o-o-o-o-
-o-o-
o

## COURS D'ESPERANTO DANS LA REGION PARISIENNE

PARIS : 1er degré : Association Philotechnique, 8, rue du Havre PARIS (St Lazare) au Lycée Condorcet. le mardi de 19 à 20 H.

Cercle de conversation : 37, bd de Vaugirard PARIS-gare Montparnasse rez-de-chaussée Porte A 103. le mercredi de 18 à 20 H.

BOURG-LA-REINE : Centre Administratif, 7, place Condorcet le mardi à 20.45 H. S'adresser : Mme AMARIGLIO 5, rue René Roekel 92340 Bourg-la-Reine.

CLAMART : S'adresser : M. E.GAUDRY 99, rue du Parc 92140 Clamart.

LE PERREUX : 1er degré : Lycée Paul Doumer- 2, rue Paul Doumer ,le mardi à 20.15 H.

Perfectionnement : 34, av, G.Clémenceau , le jeudi à 20.45 H.

Cercle de conversation : même adresse , le 4ème jeudi à 20.45 H.

RUEIL-MALMAISON : Cercle Culturel et Interlinguistique - Comité d'Action Sociale de Rueil-Buzenval - 1 B, rue Paul Gimont : le mercredi à 20.30 H.

SAINTE-GENEVIEVE-DES-BOIS : RENAISSANCE ET CULTURE (Essonne-Espéranto) 4, rue Luebnecht, Résidence St Hubert-91700 Sainte-Geneviève-des-bois, le jeudi à 20.30 H.

SURESNES : 1er degré : Ecole Jules Ferry, rue Jules Ferry. Le mardi à 20.30 H.

Cercle : Maison Européenne de la Jeunesse et de la Culture, 43, bd Henri Sellier , le 4ème jeudi à 20.30 H.

COURS PAR CORRESPONDANCE DE U.F.E. : 4 bis, rue de la Cerisaie 75004 PARIS.

FERVOJISTOJ : S'adresser : F.F.E.A. 11, rue de Milan 75009 PARIS .

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Michel GUILLAUME, membre de notre fédération, est l'auteur d'une nouvelle méthode pour apprendre la Langue Internationale : " Paŝo post paŝo "....
L'Espéranto "pas à pas" en 19 semaines, sur 120 feuillets _ Prix : 10 F. fo chez: M.Guillaume :101, av Jean Lolive, bât. A, 6ème étage - 93500 PANTIN.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

La materialo de la venonta bulteno nepre devos alveni antaŭ la 21-a de Decembro al : R. Despiney 43, quai de Champagne LE PERREUX (94170)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

## KALENDARO NOVEMBRO 1 9 7 3 - J A N U A R O 1 9 7 4

NOVEMBRO

9 LITERATURA KUNVENO . . . . . . . . . ( vidu ĉe paĝo 1a ).

10 Estrara kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14.45 H. (ne publika)

DECEMBRO

8 Konsilia kunveno, ĉe Cerisaie, je la 14.45 H. Iu ajn membro rajtas partopreni kiel observanto.

La kutima Zamenhofa Vespero estos anoncato de la bulteno de la Pariza Grupo.

JANUARO 1974

12 Estrara kunveno, ĉe Cerisaie, je la i4.45 H. (ne publika)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

GRAVAJ KUNVENOJ EN 1 9 7 4

| | | | |
|---|---|---|---|
| Pariza federacia Kongreso | : Ste Geneviève D/B | | 10 MARTO |
| NACIA KONGRESO | : St Etienne | 30 MARTO | - 2 APRILO . |
| UNIVERSALA KONGRESO | : Hamburgo | 27 JULIO | - 3 AUGUSTO |